

Eŭropa Bulteno

Decembro 2014, Numero 144

NOVJARA MESAĜO DE LA REDAKTORO



Malantaŭ ni estas plia sukcesa jaro en kiu EEU atingis tre kontentige la finon de granda du-jara projekto lingvo.info kiu esence tenis la financon fortecon de la Unuiĝo. Ni organizis ankaŭ nian 10-an jubilean kongreson en Rijeka, kiu ĉiusence krom pro sia malgrandeco estis reprezenta kaj sukcesa aranĝo donante novajn spronojn por la eŭropa E-movado. EEU plue kaj nun subtenita ankaŭ de E@I kaj Studenta Eŭropa Organizo AEGEE (kiun reprezentas ankaŭ esperantisto) aktivis en Eŭropa Platformo de Civitanaj Organizoj pri Multilingvismo starigita de Eŭropa Komisiono kaj tiamaniere retenis oficialan statuson en organoj de EU. Nia delegitaro estis akceptita de la kroata ŝtatprezidanto kiu deklaris subtenon al Esperanto. Plian fojon ni sukcese aktivis en Ekonomia Forumo en Krynica kiun niaj reprezentantoj bone eluzis kune kun la reprezentantoj de UEA por kontakti diversajn gravulojn, sed ĉefe por diskutoj kun prof. Wittbrodt, senatano de Pollando kaj gvidanto de poresperanta grupo. Kaj la pinto de la jaro 2014 estis oktobra novaĵo de Pola ministerio pri kulturo kiu oficialigis Esperanton kiel kulturan nematerian heredaĵon de Pollando, metinte tiel fundamentan ŝtonon en senprecedenca historiaĵo: unua oficiala agnosko de Esperanto far iu ŝtato. Necesas ĉi tie diri ke en tiu sukceso entreprenita de kelkaj polaj esperantistoj tamen grave kontribuis ankaŭ EEU. La estraro, antaŭ ĉio ĝia prezidanto kaj Jozef Reinvert, intense kunlaboris kun prof. Edmund Wittbrodt pri tiu temo kaj aparte dum la Ekonomia Forumo en Krynica kaj tio certe influis lian decidemon helpi ke la iniciato estu kronita per la oficiala agnosko.

Ĉi-jare okazis ankaŭ elektoj de la estraro en kiu nun estas ses personoj konsistantaj el la jam sperta kaj unueca teamo plus nova membrino Sandra Schweder, germanino laboranta en

Bruselo. Mi opinias ke la teamo estas tre bona por atingi pliajn novajn sukcesojn sur la jam grave traborita vojo, sed ankaŭ kun kapablo rapide adaptiĝi al necesaj ŝanĝoj.

Oni povas konstati ke EEU daŭre evoluas kontentige kaj ke la rezultoj subtenas nian optimismon. Ni do plu restis bonaj reprezentantoj de la E-movado antaŭ la organoj de EU (agante an la Platformo kaj gvidante grandan Eŭropan projekton financitan de EU) kaj samtempe stimulantoj de la landaj asocioj entrepreni aktivadojn tuteŭropajn.

Tamen ni havis ankaŭ amarajn spertojn. Nia entuziasmo pri la ŝancoj sukcesi pri Esperanto kadre de la eŭropaj instancoj iom ŝrumpis, ĉefe pro la malsukceso rilate nian proponon pri Popola Iniciato kanti eŭropan himnon en Esperanto. Montriĝis ke EU havas burokratajn murojn, kiuj ne koincidas kun la proklamita demokratio kaj ebla influo de la civitanaro al politikaj decidoj, do iuj neelektitaj oficistoj kiuj sen devi respondeci ĉu al politikaj organoj, ĉu al iu plendprocedo simple arbitre povas forĵeti iniciatojn, kaj al tio eĉ Ombudsmano estas senpova. Tio montris ke ekzistas seriozaj malhelpaj faktoroj kiuj vidas Esperanton kiel malamikon. Alia amara sperto rilatis al la fakto ke EAB (Brita E-asocio) decidis eliri el EEU kaj ne plu kunlabori ŝajne pro malkonsento subteni la ĝisnunan politikon de la organoj de EEU aktive subteni bazajn celojn de EU pri fortigado de ties integrigaj procedoj. Tiusence nia estonta politiko devos sekvi pli ruzajn kaj singardajn metodojn en rilatoj kun organoj de EU. Tamen, la startpozicion ni havas: la polan decidon pri kultura nemateria heredaĵo. Ni klopodos stimuli aliajn landajn organizojn fari same kaj poste baze de tio prezenti proponon al EU. Aliflanke ni devos pli aktive kunlabori kun la landaj asocioj klarigante niajn decidojn kaj prezentante la kaŭzojn por nia strategio.

Mi deziras al ĉiuj eŭropaj esperantistoj personan bonfarcon en 2015 kaj pli da poresperantaj iniciatoj.

Zlatko Tišljarić

KUNSIDOJ DE LA ASEMBLEO DE EEU OKAZOS DUM LA 100-a UK EN LILLO



La regula jarkunsido de la Asembleo de EEU estos dum la Universala Kongreso de Esperanto en Lillo (Francio) iam en la komencaj tagoj. Ankaŭ la publika kunsido de la asembleo okazos tie.

Pri detala tagordo kaj temaro diskutota ni informos la assembleanojn kiam ni fiksos kun UEA la precizajn datojn kaj horojn, verŝajne unu monaton antaŭ la kongreso. Sed ni volas atentigi aparte tiujn assembleanojn kiuj ne ankoraŭ decidis ĉu iri al UK,

ke ili faru tion. La retejo pri la UK renoviĝis kaj estas nun plenplena je detalaj informoj:

<http://www.lille2015.fr>

Ĝis revido en Lillo.

La estraro de EEU

EEU REALIGIS LA PLEJ GRANDAN PROJEKTON EN SIA HISTORIO



Kiel konate, en 2012 estis aprobita projektpropono „lingvo.info“ de EEU ĉe tiama EU-fondaĵo por tutviva lernado kadre de la projektlinio KA2 (lingvoj), taksita je 530.000 eŭroj. Sumo neimageble granda kompare kun la ĝistiamaj enspezoj de EEU, organizaĵo sen havaĵoj, kunordiganta nur landajn E-asociojn de EU. Baze de la ideo de iama retpaĝaro lingva prismo, Jevgenij Gaus, Maja Tišljar kaj Petro Balaž ellaboris la projekton lingvo.info. Laŭ la reguloj, Eŭropa Komisiono aprobas 75% de la sumo ,

do ĉirkaŭ 400.000 eŭrojn kaj la ceteron devas trovi diversmaniere la partneroj en la projekto. La partneroj de EEU estis la jenaj: E@I el Slovakio, Studio Gaus el Berlino (Germanio), Suddana Universitato el Odense (Danlando), Universitato A. Mickiewicz el Poznan (Pollando), Lingva Instituto Ludovit Štur el Bratislavo (Slovakio), Asocio por Eŭropa Konscio el Maribor (Slovenio), Rusa Kulturcentro el Vilno (Litovio) kaj reklamagentejo Visetas el Kaunas (Litovio).





La starto de la projekto por kiu EU pretis doni 400.000 eŭrojn tamen estis kondiĉita. Necesis havi garantion, ke kaze de misadministrado de tiu mono aŭ nesufiĉe kvailtaj rezultoj de la projekto

ekzistas iu kiu pagos eventuale fuŝitan sumon aŭ punon por nesufiĉe kvailta laboro. Tiun bazan kondiĉon plenumis nia neimageble sindonema estraranino, vicprezidentino Flory Witdoeck, kiu subskribis garantion per la posedo de la propra entrepreno kaj personaj posedaĵoj. Tian grandegan sinoferon ni ĉiuj devis pravigi kaj maksimume kvalite el ĉiuj vidpunktoj realigi ĉiujn projektajn taskojn. Interalie antaŭ ni troviĝis enorma administre financa laboro pri detala distribuado de la mono inter partneroj, prizorgo de propraj bezonataj enspezoj (25%) kaj tre preciza kontrolado de la elspezoj de ĉiuj partneroj kio inkluzivas kontrolon de ĉiu eĉ plej eta kvitanco de ĉiu partnero por kompletaj kostoj de pli ol 530.000 EUR. Fine de la unua jaro, fine de novembro 2013 (la projekto estis aprobita por du jaroj (de decembro 2012 ĝis novembro 2014), necesis transdoni raporton pri la efektivigita laboro kaj ankaŭ pri la financaj enspezoj kaj elspezoj akurate laŭ la projekta plano kaj financaj reguloj de EU. La USB-ŝlosileto sendita al Bruselo kun la raporto enhavis entute ĉirkaŭ 160 unuopajn dosierojn. Kaj nun post la fino ni devas transdoni la finan raporton. Tio signifas ke necesas listigi ĉiun eĉ plej etan pagon de ĉiuj partneroj kaj kolekti kopiojn de ĉiuj fakturoj, kvintancoj kaj salajropago kaj klarigi pri ĉiuj kostoj por kio ili bezonatis en la projekto. Nur se financaj kontrolistoj de EU konstatos ke ni plenumis ĉion laŭkontrakte kaj laŭregule, kaj se la rezultoj estos taksitaj sufiĉe bonkvalitaj, ni ricevos la finajn 20% de la aprobita sumo aŭ kaze de trovitaj malĝustaĵoj EU decidus ne doni parton de la sumo aŭ eble eĉ postuli partan repagon.


Tiun grandegan administran laboregon gvidis kaj plugvidas en la lasta plej streĉa fazo de preparado de la fina raporto Maja Tiŝljara daŭre kontrolante kaj konsilante financajn stabojn de ĉiuj partneroj kaj zorgante pri amaso da dokumentaro. Tiu kiu ne okupiĝis pri tia laboro ne povas imagi ke necesas prepari milojn da dokumentoj kaj formularoj kiuj devas tre precize montri ke la elspezoj sekvis la regulojn kaj la kontrakton. La fina raporto konsistas el du skribaj raportoj kiuj ampleksas ĉirkaŭ 100 paĝojn, la financa raporto kaj aldonaĵo de entute ĉirkaŭ 200-300 unuopaj dosieroj prienhavaj kaj prifinancaj.

Etimologio estas studado de historio de vortoj, ilia deveno kaj ŝanĝiĝo de iliaj formoj kaj signifoj. Por lingvoj, kiuj havas longan skriban historion, etimologiistoj uzas tekstojn por kompreni, kiel vortoj estis uzataj en pli fruaj epokoj kaj kiam ili eniris lingvon. Etimologiistoj uzas ankaŭ komparan lingvosciencan por rekonstrui informojn pri lingvoj, kiam neniu rekta informo ekzistas.



La projekto mem antaŭvidis kreon de granda retejo en kiu eblus trovi science ĝustajn, tamen simplajn kaj eĉ amuzajn informojn pri dudeko da lingvoj (ĉefe eŭropaj), ĉar ĝia celo estis popularigi la interesiĝon de antaŭ ĉio junaj eŭropanoj pri lingvoj (ne nur pri unu lingvo). La unua laboro estis decidi el kiuj informoj konsistos la retejo kaj post unujara laboro estis decidite ke ĝi konsistu el 4 partoj kaj multaj tekstoj jam estis verkitaj. Unua parto nomita Babilono prezentas mallongajn informojn pri lingvo kaj lingvistiko ĝenerale, kion necesas scii por povi kompreni konkretajn klarigojn pri pli ol dudek lingvoj kun tre diversaj lingvaj strukturoj. La

laborteamo decidis ke tiun parton oni disdividu je 15 ĉapitroj kaj la partneroj devis kumeti tesktojn por tuj ĉapitroj laŭ propraj interesoj kaj kapabloj.



La dua parto nomita Lingvopedio estis priskribo de nun, fine de la projekto, 28 eŭropaj lingvoj. Por tio necesis ellabori skemon laŭ kiu fakuloj de la partneroj priskribos tiujn lingvojn, ke ĝi enhavu la plej gravajn informojn, karakterizojn de

ĉiuj tiuj lingvoj, mallonge pri ilia historia evoluo kaj specialaĵoj. Por ĉiuj tekstaj partoj grandegan laboron krom la aŭtoroj faris la ĉefredaktorino de la tuta enhavo Maja Cimerman Sitar de la slovena partnerorganizo kiu devis plurfoje relegi ĉiujn tekstojn kaj ofte eĉ pli ol duonigi la tekstojn kiujn sendis aŭtoroj, kelkfoje resendadi al ili ĉiun tekston ĝis finfine ekestis tekstoj kies kvanto iĝis tradukpreta. La teamo elpensis plurajn amuzaĵojn prilingvajn kaj ekzemple bildoj de proverboj aŭ idiomoj el pluraj lingvoj estis desegnitaj por la paĝaro.



La tria parto nomita Lingvopolis estas kolekto de plurcent ligiloj en la reto al laŭeble multaj aliaj lingvaj paĝaroj ĉe kiuj interesitoj povas laŭdezire ekscii pli aŭ eĉ lerni tiujn lingvojn kaj la kvara parto nomita GeoLingvo estas kvizoludo, kiun oni povas ludi duope, triope aŭ kun pli da ludantoj, kie oni povas lerni multe pri lingvoj kaj samtempe amuziĝi kaj ĝui en sia lernado. La ludo estas ligita al Facebook kaj eblas ligi ĝin al sia Facebook profilo kaj ludi per ensaluto al Facebook. Ni invitas ĉiujn legantojn elprovi ĝin kaj disvastigi pere de Facebook. Krome vi daŭre povas helpi al ni testi la paĝaron kaj ludon kaj sendi al ni viajn komentojn kaj informi aliajn personojn pri ĝi. Pri la paĝaro vi povas plenigi demandaron kiu haveblas en ĉiuj lingvoj de projektpartneroj kaj la rezultojn ni ankoraŭ detale analizos kaj kunsendos kun la fina raporto. Jen ligiloj al plurlingvaj demandaroj:

Esperanto: <http://goo.gl/forms/cncPNxA100>

angla: <http://goo.gl/forms/b7FtzIHjvg>

franca: <http://goo.gl/forms/hnkUFETpLL>

germana: <http://goo.gl/forms/zceSnvbCYk>

pola: <http://goo.gl/forms/6tiBLIa2Wu>

slovaka: <http://goo.gl/jp1gGM>

slovena: <http://goo.gl/forms/eXDzCtb5X0>

La unuaj du partoj kiam ili estis finpretaj konsistis el proksimume 160 paĝoj da teksto. La fina rezulto de la projekto estas esence pli granda ol promesite en la komenco: oni priskribis ne dudekon da lingvoj, sed 28 kaj oni priskribis la tuton ne en 18 sed baldaŭ en 21 lingvoj (la 21-

a traduko estos la itala kaj ĝi estos preta baldaŭ). Tio ŝajne estas tiaspeca plej granda portalo kiu enhavas prilingvajn informojn en 21 lingvoj. La avantaĝo de la portalo estas ke nun uzantoj en landoj kun malgrandaj lingvoj kiel ekzemple en Slovenio aŭ Litovio povas en la propra lingvo ekscii ĉion gravan pri same malgrandaj lingvoj kiel la latva, slovaka, irlanda aŭ malta. Sekve dum la projekto ĉiuj tradukantoj devis traduki la originalan tekston el la angla kiu kune kun la tekstoj de GeoLingvo ampleksis inter 170 kaj 180 paĝoj al 20 aliaj lingvoj, sekve ĉirkaŭ 3500 paĝoj da tekstoj ne tre simplaj kaj fakaj. Sekvis kontrolado kaj korektado kaj elprovado. La amplekso de la laboro iĝis multe pli granda ol komence pensita kaj ĉefe la traduklaboron oni faris grandparte volontule. Nur por kelkaj lingvoj pri kiuj la partneroj ne havis proprajn fakulojn, sed estis planitaj tradukoj antaŭe, oni devis pagi la traduklaboron. Sekve necesas krome elstarigi enorman subtenon al la projekto de multaj esperantistoj kiuj kontribuis per grava laboro de tradukistoj. Pluraj volontuloj helpis pere de EEU kaj E@I, inventante kelkajn semajnojn de sia laboro, traduki la paĝaron kaj ni sincere dankas al ili pro ilia entuziasmo kaj valorega laboro, kies valoro kalkuliĝas en kelkdek miloj da eŭroj! Same pluraj tradukistoj en mapli riĉaj landoj de EU laboris kontraŭ relative malaltaj pagoj kontraŭ kiuj ne eblus ricevi samkvalitajn tradukojn se ni devus pagi merkatajn prezojn. Tamen en tiuj kazoj EEU ne deziris plene voluntualan laboron ĉar ni volis per la projekta mono almenaŭ iom subteni lokajn aktivulojn. Kaj fine necesas danki al deko da esperantistoj kaj organizoj kiuj subtenis la projekton per propraj mondonacoj kiuj variis inter 100 eŭroj ĝis 4000 eŭroj. Tiujn ni citas en la fino de la artikolo.

Fine mi diru ke gravegan laboron plenumis la tuta estraro de EEU. Flory ebligis la projekton per sia sinofera decido grantii ĝin, sed ŝi ankaŭ portis la ĉefan financan kaj banklaboron kaj kune kun mi pri administrado de la financoj. Ĉiuj aliaj partoprenis en la laboro partopreninte en kelkaj kunsidoj de la teamo (la lasta okazis en Odense ĉe la Dana partnero inter la 3-a kaj 5-a de novembro 2014) kaj partopreninte en verkado de certaj partoj de la projekto kaj tradukante al siaj lingvoj. En tiu laboro partoprenis Nikola Rašić, Seán Ó Riain kaj Zlatko Tišljar dum Sandra Schweder estis unu el tradukistoj de la paĝaro al la germana. Petro Baláž kunordigis la laboron kadre de E@I, kie grandegan laboron por la projekto faris volontuloj de E@I kaj li zorgis pri produktado de reklamaj materialoj.



La takso de la juĝantoj pri la unua jaro de la laboro estis tre bona (noto 8 el 10 - reale neniu ricevas 10, kaj 9 estas la maksimumo) kaj unu el grandaj dankoj iras certe al la firmao kiu dizajnis la tuton kaj programis ĉion Studio Gaus (Jevgenij kaj Neringa Gaus). Sen ilia laboro kiu ankaŭ estis enorme pli

granda ol ili estis pagitaj la tuto estus senutila.

Kiam en majo 2015 ni havos finan takson de EU, ni povos esti fieraj, ke ni faris grandiozan laboron, kiun devos citi kaj uzi multaj en la eŭropaj instancoj. Kaj la portalo estas grandioza propagandilo de Esperanto: En ĝi estas priskribita Esperanto egalrajte kiel unu el 28 lingvoj uzataj en EU kaj la tuta paĝaro ekzistas en Esperanto kaj montras al ĉiu ke en ĝi samkvalite povas esti prezentitaj seriozaj informoj kaj fakaj artikoloj prilingvaj. La nereakta reklamo estas

LABORI POR LINGVO.INFO



Mia laboro estis simpla – verki la parton pri la irlandia lingvo, surbendigi ĉiujn irlandajn vortojn kaj frazojn, kaj poste traduki la tutan retejon, 50.086 vortojn, al la irlandia lingvo. Senpage, kompreneble, ĉar mi jam havas salajron de la Eŭropa Komisiono, kie mi laboras nuntempe. Estis sufiĉe granda laboro, sed pro multaj kialoj ĝi donis al mi grandan plezuron.

Unue mi ŝatas verki irlandlingve, kiam mi trovos tempon. Due, ĉar la enhavo de la retejo *lingvo.info* estas pasie interesa. Temas pri maniero popularigi lingvojn ĉe la ĝenerala publiko. Mi havis liberon elekti la materialon pri la irlandia lingvo, kaj mi provis fari tion kiom eble plej mallonge kaj interese por ĝenerala, ne-lingvista, publiko. Trie, ĉar la laboro igis min foje traduki aferojn irlanden pri kio mi neniam antaŭe legis en la irlandia – la terminara laboro estas fascina. Kvare, tradukante mi lernis multajn interesajn faktojn pri diversaj aliaj lingvoj. Kvine, aparta plezuro por mi estas elekti proverbojn en la irlandia, kaj legi la proverbojn en aliaj lingvoj – ŝajnas al mi ke tiuj proverboj bone montras la internan genion de popolo, kiel ĝi esprimiĝas en sia lingvo. Tio estas ĉe la koro de nacia kulturo. Kaj fine, sed eble plej grave, temas pri grava okazo montri al decidpovuloj en EU ke Esperanto estas vivanta, plenevoluinta lingvo, kaj ke endas pritrakti ĝin kun la aliaj vivantaj lingvoj kiel la franca aŭ la germana, kaj ne kun konstruataj lingvoprojektoj, kiuj neniam havas la propran lingvokomunumon.

Amuzaj aŭ strangaj tradiciaj proverboj aŭ idiomoj



Bíonn adharca fada ar na ba thar lear.

Transmaraj bovinoj havas longajn kornojn.
Malproksimaj aferoj kaj okazaĵoj ŝajnas pli valoraj ol tio,
kion oni havas ĉemane.



Nuair a imíonn an leann, imíonn an greann.

Kiam biero finiĝis, amuziĝo finiĝis.
La kvanto da amuziĝo dependas de la kvanto da biero.

Komence de 2014 mi verkis la parton pri la irlandia; junie en Zagrebo mi surbendigis la materialon, kaj inter julio kaj oktobro mi tradukis la tutan materialon irlanden. Poste oni devas ĉion relegi kaj revizii, forigi etajn erarojn, ktp. Nun grava laboro por ĉiuj legantoj de Eŭropa Bulteno estas popularigi *lingvo.info* inter amikoj kaj konatoj – tra la sociaj medioj kiel Facebook kaj ĉiel. Farante tion vi faros laboron por Esperanto, kiu estos eĉ pli efika ĉar ĝi estos nereakta. Kiel prezidanto de EEU mi apelacias al vi fari tion.

Estis granda honoro ke EEU ricevis tiun gravan projekton de EU pro la laboro de multaj kolegoj sed aparte pro la brila laboro de Maja Tišljar kaj Zlatko Tišljar. Estis aparta plezuro kunlabori kun ili por realigi tiun gravan projekton por la estonto de Esperanto kaj verdire por popularigi la multlingvismon ĝenerale. Mi esperas ke *lingvo.info* estas nur la unua el multaj tiaj projektoj kaj mi jam antaŭĝojas labori en ili.

Seán Ó Riain

EŬROPA KOMISIONO NE HAVAS KOMISIONANON PRI MULTLINGVISMO

La nova Eŭropa Komisiono jam dum kelkaj monatoj laboras. Tamen inter la 28 novaj komisionanoj neniu okupas postenon rekte respondecan pri la plurlingvismo. Laŭ la frisa politikulino Jannewietske de Vries, tio konfirmas la malkreskantan intereson en plurlingvismo ĉe la nivelo de la Eŭropa Unio. En la lastaj jaroj la Komisiono ja havis komisionanon, kiu respondecis nur pri “plurlingvismo” (Leonard Orban, 2007–2010), kaj poste komisionanon pri “eduko, kulturo, plurlingvismo kaj junularo” (Androulla Vassiliou, 2010–2014). En la nuna komisiono neniu membro respondecas rekte pri plurlingvismo.

De Vries profunde maltrankvilas pri tio, kion ŝi vidas kiel ekskluzive utilisman alproksimiĝon al lingvoj sub la nova komisiono. Ŝi atentigas, ke la nova teamo translokigas la unuecon de la funkciuloj respondecaj pri plurlingvismo de la ĝenerala direkcio “Edukado kaj Kulturo” al la ĝenerala direkcio “Dungado”. “Ĉiuj eŭropaj lingvoj – oficialaj EU-lingvoj, sed ankaŭ regionaj, minoritataj aŭ malgrand-ŝtataj lingvoj – servas por multe pli ol por ekonomiaj celoj”, – rimarkigas De Vries. Ŝi timas, ke la nova Komisiono fokusiĝos al grandaj, hegemoniaj lingvoj kaj flankenlasos malpli uzatajn lingvojn malgranda-ŝtatajn kaj regionajn.

“La estonteco de Eŭropaj lingvoj, precipe de tiuj en malpli favora situacio, dependas grandparte de tio, kiel agas la lokaj, naciaj kaj Eŭropaj institucioj. La Eŭropa lingvopolitiko devas enkalkuli la rekonadon kaj egalecan organizon de la lingva diverseco en la Eŭropa Unio, konsiderante lingvojn kiel ŝlosilajn elementojn por la socia kaj ekonomia disvolviĝo de ĉiuj popoloj de Eŭropo sendepende de politika statuso aŭ grandeco”, – diras la frisa politikulino Jannewietske de Vries.

Ŝi ankaŭ atentigas, ke la nova komisiono ignoras multnombrajn iniciatojn de la Eŭropa Parlamento. La lasta rezolucio pri la endanĝerigitaj lingvoj kaj lingva diverseco postulis pli fortan EU-subtenon kaj financadon por progresigi la malgrandajn lingvajn komunumojn en Eŭropo. Ĉi tiu rezolucio estis akceptita la 11an de septembro 2013 kun poraj voĉoj de 92 procentoj de la membroj de la Eŭropa Parlamento. Nepras vidi, kiel la nova parlamento subtenos plurlingvismon.

Dafydd ab Iago

Ĉi tiu artikolo aperis en la januara kajero de *La Ondo de Esperanto* (2015).

LA LASTA (7-A) KUNSIDO DE LA PARTNEROJ EN LA PROJEKTO LINGVO.INFO EN ODENSE

De la 3-a ĝis la 5-a de novembro 2014 okazis en dana urbo Odense, sidejo de Suddana Universitato, kiu estas unu el la partneroj, la 7-a (lasta) kunsido de la partneroj en la projekto lingvo.info. Nur unu monaton antaŭ la fino de la projekto. Teorie tio devus esti nur ferma solena kunsido, ĉar ja la projekto estas pli-malpli finita kaj nenio nova povas esti diskutata. Tamen la kunsidoj estis viglaj kaj interesaj, ĉar restis iom da mapli grandaj demandoj kaj la decido pri la ludo GeoLingvo. Krome okazis iom da polemiko pro plendo de pluraj esperantistoj ekde septembro kiam la paĝaro estis malfermita al ĉiuj difini la pozicion de Esperanto inter mondaj lingvoj, ĉar la tiama difino en ĉapitro Babilono metis Esperanton en grupon de strangaj artefaritaj lingvoj kiel klingono kaj similaj. Pro tio oni decidis aldoni novan ĉapitron Lingvo kaj identeco (kiun verkis mi) kaj anstataŭigi la ĝistiaman tekston en la ĉapitro Lingvoplanado kaj konstruitaj lingvoj. Tiun novan tekston, kiu kontentigis ĉiujn verkis Eckhard Bick.



En la kunsidoj partoprenis 15 personoj. Oni traktis ankaŭ la finan raporton kaj taskojn de ĉiuj kiujn ili havas pri tiu temo. La Danaj gastigantoj zorgis pri tio ke ni vidu diversajn restoraciojn vespermanĝe kaj tiel konu la lokajn kutimojn. Eblis mallonge viziti ankaŭ la ĉarman urbon de Hans Christian Andersen (kiu tie naskiĝis).

La teamo kiu tie finis sian serion da laborrenkontiĝoj pro la kunlaborado en la dujara projekto restos plu ligita per prizorgo de la paĝaro kaj supozeble almenaŭ kelkaj el la partneroj plu kunlaboros en aliaj novaj projektoj.

Zlatko Tišljarić

PARTORENO DE LINGVO.INFO EN EXPOLINGUA – GRANDA LINGVA FOIRO EN BERLINO

Fine de novembro ĉiujare en Berlino okazas granda lingva foiro Expolingua kiun ĉi-jare vizitis ĉirkaŭ 10.000 vizitantoj dum 2 tagoj, la 21-an kaj 22-an de novembro. En la forio grandan standon havis Studio GAUS kaj E@I, en kiu prezentiĝis 3 projektoj, sed inter ili ĉi-jare la ĉefan rolon havis lingvo.info. La standon preparis kaj prizorgis Jevegenij Gaus, Peter Baláž kaj Maja Tišljár kun helpo de du berlinaj helpantinoj.



Maja Tišljár

INVITO DISTRIBUI LIBRON PRI LA STATO DE E-MOVADO EN EU-LANDOJ

Inter la jaroj 2010 kaj 2013 Eŭropa Bulteno sukcesis aperigi artikolojn pri la stato de E-movado en ĉiuj 28 landoj de EU, unuope pri ĉiu lando. Temis pri ambicia plano kunmeti libron en kiu oni povos legi mallonge pri la evoluo de la Movado en ĉiu el la 28 landoj dum ilia historio sed aparte pri la stato en la momento de la verkado, do en periodo ĉirkaŭ la jaro 2010. Tiu libro restos grava referenco por estontaj esperantistoj, kiuj povos unuloke rapide, sen tro detala enprofundiĝo en la temaron ekscii ĉion gravan en kiu ajn el la 28 EU-landoj pri la E-movado. La libro estas konsultebla elektronikmaniere ĉe nia paĝaro, sed ĝia vera celo estos trafita kiam ni havos paperforman libron kiun ĉiu Landa asocio, ĉiu E-biblioteko, ĉiu E-societo kaj ĉiuj interesitaj individuaj esperantistoj povos meti sur sian bretaron kaj konsulti kiam ajn necesos.

La eldonisto estos EEU kaj la plano estas aperigi la libron antaŭ la UK en Lillo. Sed por povi fari tion, EEU devas havi garantiitan minimuman eldonkvanton, do garantiitan kvanton da antaŭaĉetoj. La bela libro kun multaj koloraj fotoj kostos en antaŭmendo ĉirkaŭ 20 eŭrojn kaj poste 30. Ni invitas landajn asociojn en EU-landoj decidi kiom da libroj ĉiu el ili pretas antaŭmendi por distribui en sia lando. Ni petas informu nin pri tio plej malfrue ĝis fino de

januaro. Se ni ne ricevos sufiĉajn mendojn (minimуме 200) ni devos bedaŭrinde rezigni pri la eldono.

Flory Witdoeckt

HUMPHREY TONKIN 75-JARA



La 2-an de decembro festas sian 75-an datrevenon prof. Humphrey Tonkin, eksa prezidanto de UEA kaj TEJO. Tonkin, kiu esperantistiĝis en 1956, estis estrarano de TEJO de 1961 ĝis 1971, de 1969 ĝis 1971 kiel prezidanto. En tiu periodo li fondis la revuon *Kontakto* kaj estis ĝia unua redaktoro. En 1974 li fariĝis prezidanto de UEA, kiun funkcion li plenumis ĝis 1980 kaj denove de 1986 ĝis 1989. De 2001 ĝis 2004 li estis vicprezidanto de UEA. Tonkin

estas Honora Prezidanto de TEJO kaj membro de la Honora Patrona Komitato de UEA. Li estas ankaŭ longtempa direktoro de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED). Ekde 2002 li estas prezidanto de la komisiono pri la Belartaj Konkursoj de UEA. Tonkin aktivas ankaŭ kiel aŭtoro, tradukisto kaj recenzisto, kaj li estas ŝatata oratoro kaj preleganto. Fakulo pri Ŝekspiro, li ofte prelegis pri lia verkaro, interalie en la Internacia Kongresa Universitato. Li ankaŭ esperantigis la dramojn *La vivo de Henriko Kvina* (2003) kaj *La vintra fabelo* (2006) de Ŝekspiro.

Okaze de la 70-a datreveno de Tonkin UEA eldonis la festlibron „La arto labori kun» (red. Detlev Blanke kaj Ulrich Lins) kun artikoloj de 100 aŭtoroj. La impona, 900-paĝa verko estas ankoraŭ aĉetebla ĉe la Libroservo de UEA. Filmo pri la transdono de la libro al Tonkin estas videbla en la Reta Kinejo de UEA.

Gazetaraj komunikoj de UEA



SUBTENANTO DE ESPERANTO – NOVA URBESTRO DE SLUPSK (POLLANDO)

La nova urbestro post la balotoj en novembro en pola urbo Słupsk (antaŭe vojevodiar urbo) estas Robert Biedroń. Li estas ano de EDE-Pollando kaj ano de parlamenta grupo subtenanta Esperanton. Li ofte malferme esprimis sian subtenon al esperanto. Jen

ligilo pri tiu novaĵo: <http://wiadomosci.wp.pl/kat,1329,opage,2,title,Robert-Biedron-wygral-w-Slupsku-Wstepne-wyniki-II-tury-wyborow,wid,17069456,wiadomosc.html#opinie>

Eduardo Kozyra

LA PLEJ PAROLATAJ LINGVOJ EN LA MONDO

Laŭ la internacia entrepreno "Worldwide Translation Services Ltd"

<http://www.wwt-services.co.uk/> estas la jena stato pri la plej parolataj lingvoj laŭ tri subaj kriterioj:

1. Laŭ la gepatra lingvo:
 - 845 milionoj - la ĉinmandarena
 - 329 milionoj - la hispana
 - 328 milionoj - la angla
 - 240 milionoj - la hindua
 - 232 milionoj - la araba
2. Laŭ la nombro de parolantoj kiuj uzas la lingvon malsaman ol la gepatra:
 - la angla kaj la ĉinmandarena (mil milionoj ambaŭ)
 - la hindua
 - la hispana
 - la rusa
3. Laŭ la uzo en la reto:
 - 27% - la angla
 - 22% - la ĉinmandarena
 - 7% - la hispana
 - 5% - la japana
 - 4% - la portugala

J-K Rinaldo el Padova

NI KONSERVU LA MEMORON DE LA KATALUNA ESPERANTO-HISTORIO

Kataluna Esperanto-Asocio (KEA) lanĉis amasfinancadan kampanjon ĉe

<http://www.verkami.com/locale/eo/projects/100666-bapn> por renovigi la Biblioteko-Arĥivon Petro Nuez (BAPN), kiu enhavas gravajn historiajn dokumentojn de antaŭ pli ol 100 jaroj. Ĝi urĝe bezonas restrukturiĝon, por protekti tiun gravan parton de la historio de Esperanto en Katalunio.

En la unua fazo de la kampanjo oni celas atingi 6000 eŭrojn por renovigi la plankon de la ejo kaj starigi kvar bibliotekajn bretarojn. En estonta dua fazo, la kampanjo celas kolekti pliajn 4000 eŭrojn por aldoni du pliajn bretarojn, tablon kaj seĝon novajn kaj la komputilaĵojn necesajn por katalogi la enhavon de la BAPN, kiu estos parto de la naskiĝanta tutmonda katalogo de esperanto-bibliotekoj.

Biblioteko Arkivo Petro Nuez (BAPN) estas biblioteko-arĥivo de Kataluna Esperanto-Asocio registrita en la reto de specialigitaj bibliotekoj de la registaro de Katalunio. La kampanjo estas en la retejo Verkami, la pionira amasfinancada interretejo de Katalunio, kies nomo venas de la esperantaj vortoj "verki" kaj "ami". La proponataj rekomencoj por la donacoj povas esti simpla danko kaj invito al inaŭguro, publikigo de la nomo en ŝildo sur la muro de la ejo, sed oni ankaŭ proponas vespermanĝojn, gastigadojn, ciceronadojn, kulturajn profesiajn vizitojn en Esperanto, kvalitajn artajn bierojn kun esperanta nomo, ekzemplerojn de *La Eta Princo*,

Asteriks, aŭ la lastajn eldonajn novaĵojn de la kataluna asocio, kursojn, t-ĉemizojn, diskojn kaj eĉ koncertojn de Kaj Tiel Plu. La plej donemajn mecenatojn eĉ honorigos la Katalunaj Kongresoj de Esperanto.

Ferriòl Macip

SUKCESE FINITA COMENIUS-PROJEKTO

En aŭtuno 2014 finiĝis la 2-jara Eŭropa Comenis-projekto kun partopreno de lernejoj el Herzberg am Harz (Germanio), Győr (Hungario) kaj Mazara del Vallo (Italio). La tre sukcesa projekto havis la titolon: De la loka kastelo al la Esperanto-Domo kaj celis trejni lernantojn por fariĝi ĉiĉeronoj en sia regiono, kiuj povas informi vizitantojn pri lokaj vidindaĵoj, historio, kulturo, arto, tradicioj.

Projektproduktoj:

- kvinlingva (Esperanta, angla, germana, hungara, itala) turisma vortareto
- broŝuro kun modelaj konversacioj kaj ekzercoj, instrukcioj por ĉiĉeronoj
- mallongaj modelaj tekstoj pri vidindaĵoj en Herzberg am Harz - la Esperanto-urbo
- multaj fotoj, filmoj, gazetartikoloj pri la eventoj, partneraj renkontiĝoj kaj vizititaj lokoj

Legu ĉiujn gravajn informojn en kvar lingvoj sur la projektpaĝaro: <http://comenius.esperanto-urbo.de>. Tie vi povas vidi fotojn kaj filmojn en la albumoj kaj studi resumon pri la eventoj.

Zsafia Korody

TRIA TUTMONDA KONFEENCO PRI INSTRUADO DE ESPERANTO



Invito iris de eta Ŝtato, konkrete de la Respubliko kaj Kantono de Neuchâtel, Svislando, al ĉiuj Ŝtatoj de la mondo. En la kantono Neuchâtel troviĝas la ĉefurbo Neuchâtel kaj la urbo La Chaux-de-Fonds, kie troviĝas CDELI, grava arkivejo pri planlingvoj. En tiuj du urboj okazos la Kolokvo. (En la franca: “Conférence”; en Esperanto “Kolokvo”, ĉar ILEI okazigas ĉiun jaron Konferencon) La datoj estas **13a ĝis 16a de majo 2015**, do en la jubilea jaro UNESKO-

ESPERANTO Montevideo 60.

La unua tia Konferenco okazis en Ĝenevo en 1922, la dua en Prago en 1927. Estos la tria. ILEI estas la organizanto. La Kolokvo okazas sub la aŭspicioj de Svisa Esperanto-Societo kaj Universala Esperanto Asocio. Naskiĝis laborgrupo por pripensi la enhavon de tiu grava kunveno. Ĝi konsistas el Duncan Charters, Mark Fettes, Mireille Grosjean kaj Humphrey Tonkin.

Celoj de la Kolokvo

- Kolekti prezenton de la nuntempaj metodoj uzataj por lerni.
- Kolekti prezenton de la nuntempaj metodoj uzataj por instrui.
- Agnoskoj de Eo en la diversaj instrusistemoj, diplomigo pri Eo, estontaj paŝoj por evoluigi kaj firmigi tiun aspekton.
- Instruista trejnado : kiel plibonigi ĝin kaj diplomigi novajn instruistojn.
- Kolekti rezultojn kaj observojn pri konsekvencoj de la lernado de Esperanto (lernhelpa efiko) ilo al enkonduko por lingvoinstruado
- Kolekti rezultojn kaj observojn pri konsekvencoj de la lernado de Esperanto kiel elemento en politiko de multlingvismo. Evoluigi strategiojn ĉirilate.
- Kolekti rezultojn kaj observojn pri konsekvencoj de la lernado de Esperanto en la kampoj de psikologio, akiro de interkulturaj kapabloj, solidareco, toleremo, malfermi la mondon al infanoj
- Kiel kaj kiom Eo povas kontribui al la jarmilaj celoj de Unesko kaj UN en la kampoj de alfabetigo kaj daŭripova evoluo?
- Diversaj pedagogimovadoj (Freinet kaj aliaj) en rilato kun Eo
- Interŝanĝo de spertoj
- Renkontiĝo kun lokaj fakuloj

Ni povas supozi, ke ne venos ŝtatestroj aŭ edukministroj. Sed eble partoprenos kulturaj ataŝeoj, kiuj la tutan jaron laboras en la svisa ĉefurbo Berno. La Kolokvo estos anoncita en la Universitato kaj la publiko, gestudentoj kaj aliaj, havos senpagan aliron al la prelegoj. La salono enhavas 440 sidlokojn. Multaj esperantistoj kaptos la okazon veni al Svislando por ekscii pri la nuntempa evoluo de la instruado de Esperanto kaj pri la estontaj ebloj.

Mireille Grosjean

Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Finredaktita: la 30-an de decembro 2014

Redaktoro: Zlatko Tišljarić

En la numero kunlaboris: Zlatko Tišljarić, Seán Ó Riain, Maja Tišljarić, Dafydd ab Iago, Flory Witdoeck, Gazetaraj Komunikoj de UEA, Eduardo Kozyra, J-K Rinaldo el Padova, Ferriòl Macip, Zsafia Korody, Mireille Grosjean.

Kontakto: ztisljar@gmail.com

Retpaĝo: <http://www.europo.eu/eo/europa-bulteno>

